

Theodor Storm,
Kristnaska kanto

tradukita de Manfredo Ratislavo

De la ĉielo ĝis la tero
malsupren ridas milda stel';
de l' abiar' odor-aero
blovadas spire tra l' etero
kaj nokte regas brila hel'.

Plenigas min ĝojiga timo.
Ja estas nun la sankta hor'!
Sonoras en la malproksimo
preĝeja sonoril'. – Sen limo
feliĉa estas mia kor'.

Min ree tenas sorĉo pia.
Adore, mire staras mi,
aperas al animo mia
infana songo idilia.
Miraklo estas tio ĉi.

*Traduko de la Germana poemo "Weihnachtslied" de THEODOR STORM (Teodoro Stormo, *1817-09-14 – †1888-07-04) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04).*

Arg-107-216 (2003-12-25 22:06:31)